

**Streso -
kio estas ĝi kaj
kiel alfronti ĝin?**



Esperanta Kongreso de la Ŝtato San-Paŭlo

12 - 15 novembro 2022

<https://esperanto.org.br/kongreso>

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Bela ekzemplo
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**
Diskutejo por nia afero
- 6 | **Por via medito**
Streso - kio estas ĝi kaj
kiel alfronti ĝin?
- 9 | **Iom da scienco**
Verda hidrogeno: kio ĝi estas kaj
kiel ĝi estas produktata.
- 11 | **Kino kaj aliaj artoj**
Sovaĝaj rakontoj
- 12 | **Naturmedio**
Amletero
- 14 | **Iom da filozofio**
La leĝo de Murphy kaj la prudento
- 16 | **Opiniangulo**
Libereco
- 17 | **Iom da poezio**
Paulo Leminsk
- 18 | **Popola saĝo**
Afrikaj aforismoj
- 20 | **Literaturo**
Du mikronoveloj
- 21 | **El la vivo de instruisto**
Valoraj ĉenoj
- 22 | **Movado**
JESP informas
- 23 | **Iom da gramatiko**
Adverbigo de prepozicioj
- 25 | **Virtuala Fenestro**
Instruado de Interlingvistiko
kaj de Esperanto en filologiaj
kursoj de UFPR

la lampiro

63-ajaro n-ro 177 2022:5

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭantoj

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2022

Simple Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Bela ekzemplo

En ĉi tiu numero de nia revuo Samideano David Bianchini donacis al ni valoran tekston. Temas pri malsano moderna kaj terura — “Streso”. Ĉu ĝi koncernas ankaŭ nin, Esperantistojn? Kompreneble! Ni vivas en nia mondo, kie ne mankas okazoj por streĉiĝoj. Ĉu la Esperanto-movado estas medio, kie ni povas mildigi niajn angorojn? Ĉu la internaciaj eblecoj pri amikaj rilatoj kaj kultura riĉiĝo favoras nin, ĉi-rilate? Legu la tekston kaj sendu al ni vian


opinion.

De samideano Célio Freitas, loĝanta en Bolivio, ni ricevis la ligilon al la revuo Ora Ĵurnalo: http://www.esperanto-gbg.org/oraklubo/Ora_Jxurnalo_n-ro_55.pdf. En ĉi tiuj numero, niaj svedaj geamikoj republikigis artikolon el La Lampiro, pri sveda artistino. Ĝin verkis nia fidela kontribuanto Anna Lobo de Carvalho. Ĉu ne bela ekzemplo de kunlabora interŝanĝo? Koran saluton al la Ora Ĵurnalo!

Dume, alproksimiĝas la unua postpandemia Brazila Kongreso de Esperanto (kune kun la kongresoj de EASP kaj de BEJO), en la bela urbo Ribeirão Preto. Post la stresiga pandemio, jen ni povos denove brakumi kaj manpremi!

Bonan legadon al vi!

Paulo Sergio Viana



Diskutejo por nia afero

Saluton, karaj geamikoj.

Hodiaŭ estas granda tago. Tion mi diras al vi ĉiuj, kiuj venos al nia kongreso en la urbo Ribeirão Preto. Ĝi estos tre bona evento post la pandemio, tial mi alvokas vin ĉiujn partopreni, transdoni al ni viajn ideojn, viajn mesaĝojn.



Kio estas la grava elemento en la kongreso? Tio estas vi! Nur vi, homoj en la Esperanta mondo estas esence gravaj por la movado, por nia idealo, por la vojirado de Esperanto tra la landoj de la mondo.

Ni parolu pri Esperanto ĉie, sed unuloke ni diskutu pri nia afero: en la kongreso.

Junuloj estas por ni tre gravaj, ĉar ili plu antaŭenigos nian movadon. Kion vi, juna Esperantisto, proponas? Venu, partoprenu kaj diru tion al ni!

Nia mondo trapasas delikatan momenton pro milito, pandemio kaj aliaj problemoj. Kion ni povas fari por pacigi la koron de la homaro? Kiel ni donu amon al la mondo, respekton al la kunhomoj?

Alvenu, ni diskutu tiajn aferojn! Via ĉeesto treege gravas por ni!

Esmeraldo Aparecido de Alencar

Streso - kio estas ĝi kaj kiel alfronti ĝin?

Kiel vi fartas, mia kara? Jen demando farita de ni ĉiuj al niaj amikoj. Nuntempe, pro la rapideco de la vivo, multfoje la demandito eĉ ne pensas, kaj tuj respondas: “Bone, bone, mi fartas bone... la vivo fluas rapide, mi ne havas tempon, ĝis mia kara...” Jen la post-moderna mondo, postulanta rapidecon al ni ĉiuj.

Ni scias ke pro tro da laboro, multegaj informoj, kaj aliaj faktoroj, la streso pliiĝas kaj regas la vivon de multaj personoj. Do, ĉi tie oni vidos iom pri tiu grava afero. Komence estas bone scii ke iom da streso ne estas malbona por ni, ĝi estas tute natura reago al iaj situacioj minacaj. Ekzemple, antaŭ ol fari paroladon al multaj personoj, aŭ kiam ni devas prezenti projekton dum kunveno, ktp, tiuj cerbaj respondoj aperas en ni por plifortigi la atenton, kaj doni iom pli da energio por venki tiun “batalon”. Jes, ĝi estas la respondo de la korpo al certaj stimuloj kiuj reprezentas subitajn aŭ minacajn cirkonstancojn, en ĉi tiuj kondiĉoj la korpo iniciatas reagojn,

kiuj aktivigas la produktadon de hormonoj, ekzemple de adrenalino. Ĉi tio lasas la individuon en "atentigo" kaj en pozicio por reagi.

Historie, oni povas rememori niajn pratempojn kiel ĉasistoj. Kiam niaj prapatroj neatendite renkontis danĝeran beston, tuj ili devis sin defendi, la urĝa decido estas pri ataki aŭ fuĝi. Ambaŭ reagoj postulas serion de korpaj alĝustigoj. Pro tio, la korbato plirapidiĝas, ĉar la koro devas pumpi pli da sango al la muskoloj, kiuj bezonas ricevi pli da energio. Estas pliiĝo en spirado kaj sangopremo, interalie.

Vere, nuntempe oni ne trovas leonon strate kiam oni iras al laboro, sed la ĥaosa trafiko multfoje estas tre danĝera, precipe en grandaj urboj. Pro la konkurado, en laboro mem, la batalo por venki unu la alian minacas nian energion. Fakte, sennombraj situacioj hodiaŭ maltrankviligas multajn personojn kaj pro tio ili vivas en konstanta stato de elĉerpiĝo. Tamen, je la fino de la tago ĉi tiu tuta

adrenalino estas sufokita kaj la natura funkcio de la organismo perdas sian signifon. Jes, daŭra premo malbonas, kaj finfine kondukas al gravaj san-problemoj.

Do, kiel fari? Unu el la vojo estas konscii pri la maniero kiel ni traktas ĉiutagajn premojn, jes tiajn premojn, kiujn ni ne povas eviti. Fakuloj klarigas ke tiuj manieroj eble estas la ĉefa punkto por stresigi nin, ofte ĝi estas pli grava ol la situacioj mem.

Ni povas, ekzemple, pripensi pri streso en laborejo, pro tro da laboro kaj malmulte da tempo por fari ĝin. Ĉi tie la sugesto estas ke ni sciu paŭzi, reakiri la penson, trankviligi la menson kaj trovi ekvilibron denove. Ni devas fari tion, antaŭ ol malsaniĝi. Sciencistoj nomas ĝin mikroreakiro. Jes, ni povas fari kafopaŭzon kun amiko, aŭ ĉu eble, profiti por iri al pli trankvila

tagmanĝo. Ĝuste, lernu kiel aldoni paŭzajn momentojn al via tago, por doni al vi tempon por iomete malstreĉiĝi, tiel malŝaltante la mekanismojn de streso.

Alia punkto por ni ĉiuj, vidu bone, mia kara leganto, kiam streso komencas malekvilibrigi vin, haltu, kvietigu vian penson, kaj atentu vian spiron. Jes, dum unu aŭ du minutoj ne plu pensi pri io ajn, koncentriĝu pri la spiro kaj nenio alia. Jes, nur kelkaj minutetoj sufiĉus por ke la ekvilibro reaperu.

Multaj sciencistoj nuntempe forte sugestas al ni krei la kutimon meditati. Jes, diversaj studoj jam montris ke por ke la streso ne regu nian vivon ni devas praktiki meditado. Ĝi donas al nia cerbo la kapablon rapide reekvilibrigi kiam minaca situacio okazas. La praktiko permesas al la organismo



tuj eniri la normalan staton. Tiel, la koro malrapidiĝas, sangopremo ekvilibriĝas, ŝvitado malpliĝas. La ŝablono, kiun la korpo ekigis por reagi al io, estas malŝaltita.

Fine, la lasta sugesto, vera solvo kontraŭ streso, kiu estas tre rekomendinda de psikologoj kaj kuracistoj: brakumoj. Ne subtaksu la gravecon de interhomaj rilatoj, la manko de socia subteno malfortigas nin. Havu amikojn, vizitu viajn parencojn. Brakumu la aliulojn kun deziroj por paco kaj feliĉo. La vibrado de la animo multe helpos en la ekvilibro de korpo kaj menso.

Certe ni ne sukcesos, pere de ĉi tiu mallonga teksto, pritrakti ĉion pri ĉi tiu kompleksa temo, sed nia celo estas nur atentigi nian karan leganton pri ĝia seriozeco. Malfacilas vivi grandan parton de la tempo kvazaŭ ĉiumomente ni devas esti pretaj por ĉi tiu batala aŭ fuĝa decido. Ni devas esti atentaj, ĉar la streso povas aperi kaj sin montri diversmaniere. Vidu bone, ĉu vi, aŭ amiko via, ripetade plendas pri nervaj tiko, oftaj kapturnoj, sendormeco, emocia hipersensiveco, apatio, troa laceco, nekapablo labori, angoro, koleremo, perdo de sento de humuro, longedaŭraj haŭtaj problemoj... kaj tiel plu? jen simptomoj de streso malhelpantaj la vivon.

Jen momento por agi, rigardu atente vian vivon. Ĉu la ĉiutaga laboro stresigas vin? Ĉu iaj simptomoj ade aperas? Eble, povas esti horo por viziti specialiston kiel kuracisto aŭ psikologo, ĉu ne? Certe jes, ĉar iuj el tiaj simptomoj antaŭe cititaj povas origini pro malregulado de cerba kemio, aŭ eĉ pro glandaj problemoj, kiel la tiroido, ekzemple, ĉar kiam ĝi troigas sian laboron ĝi ankaŭ malhelpas la cerbon kaj antaŭenigas angoron, sendormecon kaj nervozecon. Kelkfoje iaj simptomoj eble povas origini pro traŭmatoj kaŝitaj en la nekonscia parto de la menso, kaj kelkaj situacioj, iom similaj al alia jam pasinta, povas okazigi hodiaŭ grandan maltrankvilon, kiu finfine lasas nin ŝtreĉita, kaj ne scianta la veran kialon.

Fine, mi esperas ke niaj karaj legantoj jam konsciis pri tiu problemo nomata streso, grava problemo de nia tempo. Laŭ datumoj de la Monda Organizo pri Sano (OMS), streso influas ĉirkaŭ 90% de la monda loĝantaro. Do mia kara, sciu atente zorgi pri vi mem kaj pri viaj familianoj kaj amikoj por ke ni ĉiuj povu vivi pli feliĉaj kaj kun plej alta vivkvalito.

David Bianchini

davidesperantista@gmail.com

Verda hidrogeno: kio ĝi estas kaj kiel ĝi estas produktata

Hidrogeno estas la plej abunda kemia elemento sur la planedo kaj ekzistas nur en kombinaĵo kun aliaj, kiel akvo, kune kun oksigeno, krom kombinado kun karbono por formi hidrokarbidojn kiel gaso, karbo kaj petrolo. Tial, por ke ĝi estu uzata kiel brulaĵo, ĝi devas esti apartigita de aliaj molekuloj.

Verda hidrogeno devenas el la disrompo de molekuloj, kiuj enhavas H_2 en sia konsisto, sed ĝi diferencas de la tiel nomata griza hidrogeno, jam vaste uzata en la petrolkemia industrio kaj

en la produktado de amoniakobazaj sterkoj, kiuj uzas fosiliajn fontojn plej grave je la natura gaso. En la daŭripova kategorio, la produkto havas renovigeblajn krudaĵojn kiel etanolo, biogaso.

Granda profito rilate al verda hidrogeno estas la ebleco de eltiro el akvo. Tiusence, la suker-energia sektoro povus utiligi la restantan akvon de siaj agadoj, kiel tiu uzata por lavi sukerkanon. La ekspansio de verda hidrogeno permesus novajn direktojn en la industrio kaj en la ĉiutaga vivo, kiel la



produktadon de daŭripova ŝtalo, la tiel nomata verda ŝtalo, la anstataŭ-igon de parto de la kuirgaso kaj la provizon de aŭtoj, kamionoj kaj aliaj veturiloj.

Malgaŭ ke verda hidrogeno estas tre nova teknologio, esploroj jam estas survoje por fari la produkton realan eĉ en hejmaj medioj, kun la uzo de malgrandaj elektroliziloj, akiritaj per 3D-komputila presilo. Ĉi-okaze, akvo estus konvertita tage, fare de sun-paneloj, en hidrogenon, tiam poste ĝi povus esti uzata kiel fonto de energio nokte.


Oni kalkulas ke 2% ĝis 5% de la hidrogeno produktata en la mondo estas verda, sed en Brazilo tiu ĉi teknologio estas ĵus naskita. Kio ekzistas, nuntempe, estas eksperimentejoj, ĝenerale farataj per publika-privataj partnerecoj. Plej multe estas en Nordoriento de Brazilo pro la ekzisto de ventoenergio-parkoj kaj sunenergio-parkoj kie elektroliziloj estas konektitaj. Tiaj studoj estas gravaj pro la energiobezono de la mondo kaj la daŭripoveco de la medio.

Aleksandro Prado

Streĉu viajn literaturmuskolojn
kun ni en novembro!

la Monda Verk-Monato alvenas

Aliĝu ĉe:



Sovaĝaj rakontoj

ORIGINALA NOMO: RELATOS SALVAJES

DIREKTORO: DAMIÁN SZIFRON

AKTOROJ: RICARDO DARÍN, OSCAR MARTINEZ KAJ LEONARDO SBARAGLIA.

LANDOJ: ARGENTINO KAJ HISPANIO, 2014.

Se vi akompanas la revuon, vi eble memoras kiam mi parolis pri la filmo “La Blanka Elefanto”, en kiu rolis la brila aktoro Ricardo Darin. Ĉi-foje, mi volas konigi alian filmon kun tiu aktoro. Ekde kiam mi spektis la Blankan Elefanton kaj parolis pri ĝi antaŭ jaroj, mi volis spekti la filmon kiu lin famigis – “Sovaĝaj Rakontoj”. Antaŭ iom da tempo, ĝi fine estis trovebla ĉe la filmejo HBO Max.

Mi prenis kuraĝon kaj spektis ĝin! Kaj kia filmo! Ĝi plenkaptas la atenton per historietoj en kiuj la homoj troviĝas je siaj limoj, kaj kun ŝokaj reagoj. Tiusence, la kerno de la filmo estas rakontoj de sovaĝaj interhomaj rilatoj, bazitaj sur unu sola punkto kiu ligas ĉiujn - Venĝo. Ni promenas tra diversaj spacoj kiel restoracio, ŝoseo, aviadilo, edziĝo kaj spertos situaciojn tie okazantajn. Mi ne volas multe pli malkaŝi pri la historietoj mem, por ke vi vere

spertu la filmon. Mi tamen povas diri al vi ke ĉiuj historioj estas brile verkita kaj la aktoroj estas bonegaj por la roloj – speciale nia kara Darin! La spektantoj restas anksiaj kaj senspiraj en pluraj partoj, malgraŭ ke estas ankaŭ amuzo pro troigo en aliaj.

Mi vere indikas al vi tiun ĉi filmon, se vi estas pliaĝa aŭ kutimas al la ĝenro. Nun, la nura demando kiun mi faros al vi, kara leganto, post kiam vi spektos ĝin: Ĉu vi reagus same? Persone, mi kredas ke neniu povas sincere respondi al tia demando, sen vere sperti similan situacion. Nia limo povas esti pli proksima ol ni imagas.

Bonan spektadon, kaj ĝis la sekva filmo!

Anna Lobo de Carvalho



Amletero

Dum mi ŝvebas tra la universo en kosma danco, mi vidas vin. Tra l'eonoj mi akompanas vian evoluadon. Ne eblas ne senti vin kiel mian idaron. Kiel povus esti alie? Mi estis por vi grundo, nutrado kaj aero. Tra mi fluas energio de la vivo, kaj la nura konstanto estas mi. Vi scias, mi ĉion sentas kun vi, je ĉiu falo kaj je ĉiu sukceso.

Mi memoras, en la komenco vivo pulsadis ĉie. Estis granda entuziasmo observi la sinsekvon de okazaĵoj. Unu salto aŭ unu paŝo en alia direkto kaj ĉio povus esti malsame. Vivo pulsadis. Mi sentis proksimecon inter ĉiuj. Estis harmonia rilato.

Kaj subite vi – la homaro - aperis.

Mi vidis en vi potencon por atingi la plej altajn rangojn. Konscio pri si mem, memvolo, stariĝo estis nur unu el la malmultaj karakteroj disvolvigitaj. Komprenoble, ĉio estis iom pli krude en la komenco. Kun strumblaj paŝoj vi antaŭeniris, laŭ viaj decidoj kaj emoj.

Kun ankoraŭ nubeca percepto, multe da sango estis elverŝita en

entrepreno sin kompreni, sin protekti kaj stariĝi kiel esto. Samtempe, ankaŭ aperis muziko, teatro, arto, literaturo kaj aliaj valorajoj. Homaro tiam eliras el la koto, puriĝas ... kaj kiom rapide ĝi evoluas!

Estas surprize por mi ke en sablera tempo, teknologio kaj scienco havis tiom altan salton. Kaj mia demando estis: Ĉu homaro estas sufiĉe matura emocie por tiom rapida ŝanĝo? Respondo venis kiel bombo sur mian haŭton. Pardonu miajn larmojn nun...

Ĉio estis en tiom freneza rapideco, la plej multo el vi zorgantaj nur pri havaĵoj, mono kaj laboro... katenitaj al ekranoj, sen rigardi tion kio okazas ĉirkaŭ vi, dum ĉio trapasis kiel fulmo.

Naturo kaj rivero iom post iom mortas, sur grundoj estiĝas dezerto, malsato plivastiĝas malgraŭ strebo produkti la plej grandan kvanton da manĝo kiu grandparte perdiĝas, anksiega socio kiu ne instigas vin simple atenti pri via eno, esti ankoraŭ ne estas io valorigita tiel kiel ĝi devus esti.

Sed vi paŝas antaŭen... ĉiufoje pli malproksimen de mi.

Mi vidas, ne estas la unua fojo ke ia pandemio okazas. Kaj nun, pro malharmonio kaj aliaj cirkonstancoj, viruseto aperas kaj haltigas la homaron. Mi esperas, ke ĉiu prenu tiun spiran tempon por reanalizi siajn valorojn, ŝanĝi al novaj sintenoj rilate al si mem kaj aliaj.

Jes, mi vibras kiam mi aŭdas kriojn tra la aero. Pri flegi la mondon, solidareco, brakumo, frateco. Mi scias, vivo

povas esti abunda kaj plena por ĉiuj. Eblas konstrui pli sanan socion por la animo de la homaro, en harmonio kun mondo kaj naturo. Tio estas mia deziro por vi. Kaj mi vidas ke nuntempe tiaj voĉoj resonas pli kaj pli laŭte.

Certe estas tre malfacila momento, angora kaj granda necerteco pri la estonto. Tamen, mi kredas je reapero de homaro kiel fenikso. Mi ne diras pri ia reveno al kiel estis en pasinteco. Ja estis evoluo kaj multe da krudeco jam restas en pasinteco. Mi ne diras ke nun estas pli malbona, sed ke povas pli boniĝi laŭ la eblecoj.

Tio estas invito, simple. Invito al vi, mia idaro... miaj filoj, rigardi enen. Reprenu vian intuicion pri kiun vojon nun elekti kaj paŝi. Rekonetiĝu kun vi mem kaj tiuj ĉirkaŭ vi. Tiam vi retrovos vojon ankaŭ al mi, tiam vi sukcesos aŭskulti min. Kaj kiu scias kion ni povos krei kune poste? Estas je viaj manoj la elekto pri kiel vi volas ke tiu pandemio ŝanĝu vian vivon.

Kiel balzamon sur viajn vundojn mi elverŝas ĉi tiujn vortojn.


Panjo Tero.

Anna Lobo de Carvalho



La leĝo de Murphy kaj la prudento

En la jaro 1949, usona kapitano de aerarmeo, nomata Edward A. Murphy Jr., gvidis teston pri la efiko de la gravita forto sur la pilotojn de jetoj. Dum la testo, iu asistanto mis-instalis la elektronikajn sensorojn sur la sekurzonojn, kio nuligis la datumojn. Oni diras, ke, sciinte pri tio, Murphy komentis jene pri la neglektulo: “Se eblas fari ion erare, li tiel faros.”



Edward A. Morphy Jr.
(1918 - 1990)

Laŭ alia onidiro, iuj militistoj ĝeneraligis la komenton de Murphy, kreante la jenan frazon: “ĉio, kio povas fiiĝi, ja fiiĝos.” Kaj tiu penso disvastiĝis kiel “leĝo de Murphy”, kiu cetere estas nur homa koncepto, ne natura leĝo.

Simila ideo, tamen, estas multe pli antikva. En 1877, civilaj inĝenieroj kunsidis en Londono por diskuti pri projektoj de vaporŝipoj. En la protokolo de la kunsido estas registrita ĉi tiu diraĵo de Alfred Holt: “Oni konstatas,

ke se io damaĝa povas okazi en la maro, tio okazos pli aŭ malpli frue.”

Ordinare oni aludas al tiu “leĝo”, kiam okazas akcidentoj, gravaj aŭ ne, kaj rilatigas ĝin al pesimismo, kvankam la ideo kaŝita en ĝi tute ne devenas de pesimistoj, de homoj kun tendenco trovi, ke mal-feliĉaj okazaĵoj nepre atendos nin en la estonteco.

Tiu koncepto fakte estas utila, ĉar ĝi avertas, ke por efektivigi ion necesas prikonsideri ĉiujn danĝerojn, ĉiujn eblecojn pri misoj. Se iu ajn procedo prezentas riskon, ties gradon oni devas kiel eble plej precize kalkuli, por preventado kaj minimumigo de damaĝoj.

Kelkaj diras, ke la leĝo de Murphy estas la leĝo de la malbonŝanculoj, de tiuj, kiuj havas kontraŭ si la tutan universon, kaj multaj akceptas tiun difinon pro tio, ke la homa memor-kapablo estas selektema. Oni kutime

memoras nur la momentojn, en kiuj okazas io neatendita, kiam iu afero ne funkcias aŭ malbone funkcias. Kiam la afero iras glate, laŭatendite, oni forgesas pri eventualaj riskoj.

Danke al Edward Murphy, multaj sekureguloj estis kreitaj, en diversaj kampoj de la homa aktiveco, ĉefe en la industrio. Simpla ekzemplo, ŝajne banala, estas elektraj konektiloj, kies formato ebligas konekton laŭ ununura pozicio, por eviti elektroŝokon aŭ kurtan cirkviton.

Ankaŭ ni povas profiti de tiu kurioza nocio, por eviti malbonaĵojn en nia

vivo. Antaŭ ol diri aŭ fari ion, la atenta, prudenta homo konsideras, ke liaj vortoj aŭ liaj agoj povas kaŭzi damaĝojn, al li mem aŭ al aliaj, kaj decidas, ĉu la risko estas akceptinda aŭ ĉu pli bonas silenti, neniofari.

Do, se iam nia panpeco falos kaj ĝuste ĝia surfaco buterumita atingos la plankon, ni ne kulpigu la leĝon de Murphy, nek pensu, ke ekzistas universa konspiro kontraŭ ni (ne tiel gravaj ni estas!). Kulpigu nin mem, pro malatentemo kaj manko de prudento.

José Mauro Progiante

La plej bona kongreso kiun mi partoprenis

youtube.com/vivagazeto

5 novembro | 17h (UTC-3)

Pedro Freitas
Ribeirão Preto/SP - Brazilo

Libereco

Libereco estas vorto kaj koncepto. La vorto enhavas multajn signifojn. La koncepto, foje, estas persona, spirita, kaj ŝanĝiĝas laŭ la kunteksto, laŭ la lando, laŭ la homoj.

Ghandi diris: *“La arestejo ne estas la kradoj, kaj la libereco ne estas la strato. Estas homoj malliberigitaj sur la stratoj kaj homoj liberaj en la prizonoj.”*

Oni diras ke ne ekzistas plena libero sur tiu ĉi mondo, ĉar nia volo devas respekti la rajtojn de aliuloj kaj ili devas respekti niajn rajtojn. Do, libero sen limoj estas freneza revo.

La ekzerco de la vera libereco okazigas la pacon en la homaj rilatoj kaj en la homa spirito. Kiam niaj homaj rilatoj estas ekvilibras kaj nia koro ankaŭ estas pace, do, ni povas veturi per aŭtomobiloj aŭ motorcikloj por senti la ŝajnan mankon de limoj, kun respondecas kaj modereco.

Kelkaj homoj imagas ke la libereco estas en la rapideco, sed tio estas fantazio, nematureco, ĉar la libereco

komencas en la spirito. Se la homo ne estas pace, oni ne trovos la liberecon sur la landvojoj.

Stulta ideo estas veturi por ŝanĝi la fokuson. Fakte la atento pri la trafiko devigas la penson foriri el iu ajn alia temo, sed ne solvos la problemon! Saĝa decido estas unue solvi la aferon kaj poste veturi trankvile.


Aliaj homoj multe parolas sen pensi, sen pripensi, pri la temo kaj pri la konsekvencoj. Pro tio la homoj, ĝenerale, ne konsciiĝas pri la socia valoro kaj persona valoro, pri la kapablo kaj pri la povo kaj rajto paroli. Ordinare, tiu valoro estas malkovrita nur tiam kiam oni perdas tiujn ĉi valorojn! Sed tiuj estas homaj spertoj por la lernado de la homoj dum sia vivo.

La libereco proponas al ĉiuj respekton, sekurecon, dignon, finfine, eternajn kaj esencajn valorojn por la konstruo de la Feliĉo.

João Otávio Veiga Rodrigues

Paulo Leminsk

Paulo Leminski (1944-1989) naskiĝis en la urbo Curitiba, en la brazila suda ŝtato Paraná. Li estis unu el la ĉefaj reprezentantoj de la tiel nomata “marĝena poezio”, forte avangarda. Li verkis ankaŭ novelojn, eseojn kaj infanlibrojn.



Profunde

Paulo Leminsk

Profunde, profunde,
tre profunde,
ni ŝatus
vidi niajn problemojn
solvitaj per dekreto

de ĉi tiu tago,
tiun senrimedan ĉagrenon
oni konsideru nuligita
kaj sur ĝi — eternan silenton

laŭleĝe estu estingita ĉia
kosciencriproĉo,

malbenita estu tiu, kiu rigardos
malantaŭen,
tie malantaŭe troviĝas nenio,
kaj punktofino

sed problemojn oni ne solvas,
problemoj havas grandan
familion,
kaj dimanĉe
ili ĉiuj iras promeni
la problemo, lia edzino
kaj aliaj etaj problemidoj.

(Esperantigis **Paulo S. Viana**)

Afrikaj aforismoj - 1

*Saĝaj asertoj de afrika origino, rikoltitaj de **Hervée Tia** (Ebur-Bordo) en Quora kaj elfrancigitaj de **James R. Piton**.*

- ▶ La viro, kiu edzinigas belan virinon kaj la bienulo kun vojranda maiz-kampo havas similajn problemojn.
- ▶ Ne gravas kiom bela estas ĉerko, tio ne pelos homon avidi pri sia morto.
- ▶ Kiu postkuras la monon, tiu distanciĝas de la paco.
- ▶ Prefere inteligenta malamiko ol stulta amiko.
- ▶ Oni neniam lasu malsatulon sola en grenejo.
- ▶ Se la plenluno amas vin, kial vi strebas al steloj?
- ▶ Kiam oni portas korbon da ovoj, nepras eviti la dancadon.
- ▶ Kiam mortas maljunulo, forbruliĝas biblioteko.
- ▶ Mordito de serpento timas salamandron.
- ▶ Oni ne povas paroli pri saĝeco se ne ekzistas stultuloj.
- ▶ Kolero kaj frenezeco estas fratinoj.
- ▶ Ne sekvu iun, kiu evitas vin.
- ▶ Oni neniam subtaksu la forton de multaj idiotoj unuiĝintaj.

- ▶ La plej belaj floroj havas la plej malbonajn dornojn.
- ▶ Amo estas sendolorigilo.
- ▶ Kiam muso primokas katon, fosaĵo ne estas malproksime.
- ▶ Kiam via sola armilo estas martelo, vi vidas ĉiujn problemojn kiel najlojn.
- ▶ Vidvino estas la sola virino, kiu scias, kie ŝia edzo ĉiunokte dormas.
- ▶ Ne gravas kiom viaj sidvangoj estas premitaj, ili ĉiam restos en via postaĵo.
- ▶ Ne estas virgulinaj en la akuŝejo.
- ▶ La kolera vizaĝo de ŝafo ne malhelpas la posedanton ĝin porti al vendejo.
- ▶ Kiam oni pleniĝas de fiero mankas spaco por la saĝeco.
- ▶ Kiam oni enamiĝas, abismo similas al ĝardeno.
- ▶ Du geedzoj estas nek amikoj, nek malamikoj.
- ▶ Ne gravas kiom alte aglo flugas, iĝi revenos malsupren por serĉi manĝaĵon.
- ▶ Kiu solvas problemon per alia problemo ĉiam havos problemon en atendo.
- ▶ Ne nomu ĝangalo la arbaron, kiu vin protektas.
- ▶ La hejmo de tiu, kiun oni amas neniam ŝajnos malproksima.

(Daŭrigota)

Du mikronoveloj

Elreviĝo

Okazis en junio 2020 terura akcidento en la urbocentro. Kvazaŭ nevidebla mano min ekpuŝis, kaj mi plonĝis sur la trotuaron. Ostorompiĝoj, sukuristoj, ambulanco, kirurgio. Kiam mi vekigis el anestezo mi demandis min: ĉu mi mortas? Nu, ĉio enordas: en Paradizo oni ne portas maskon!



Maria Nazaré Laroca



Krimo

Kiel la sfinksa enigmo solvita, virino foriras per tri piedoj, portante maskon survizaĝe. Sur la placo ŝi haltas, kaŝita meze al folioj de arbeto, kaj petole ŝi demetas la maskon por priŝteli aeron.



Valoraj ĉenoj

Danilo estis mia lernanto dum kvar jaroj en elementa lernejo...

Tre agema li ankaŭ kapablis rezoni kun aparta rapideco kiam aperis interesa defio. Ĉiumatene, alveninte en la lernejon, Danilo ĉiam portis demandon al la kolegoj atendante “surprizon”: “se vi transpasas la trian lokon en disputo de kurado, en kiu loko vi restos?”. De malproksime oni aŭdis lian ridegadon pro la preskaŭ centprocento de la respondoj: “mi restos en la dua loko, simple”! Ankaŭ mi plurfoje estis viktimo lia...

Iafoje, mi lernis, de aliulo, interesan problemeton kaj decidis defii Danilon en oportuna okazo. Ĉi-foje estos mia feliĉa venkotago, mi pensis...

La tago dezirata alvenis kaj mi, plena je povo, proponis al li respondi:

“Kio, en la formiko, estas pli granda ol en la bovo?”...

Mi preskaŭ perdis la grundon sur kiu mi staris kiam li tuje respondis: “La familio”! Mi ne atendis tiun respondon, ĉar mi lernis ke la nomo “formiko” estas pli granda ol la nomo “bovo”, aldone ke mi devis pripensi lian respondon esperante malpravigi lin... Sen sukceso!

Danilo finis la bazan lernejan studon kaj translokiĝis al urbo Kampinas, kie li gradiĝis pri Filozofio kaj ĉiujare, dum mia naskiĝdato mi ricevas lian gratulmesaĝon: “Feliĉon kaj sanon, kara amiko!”

Valdemir Moreira



JESP informas

Nia junularo naskiĝis ene de grava etapo de la pandemio. Ni havis grandajn defiojn, kiujn ni devis venki. Ni tre antaŭĝojis la vakcinon. Ĝi alvenis, kaj, paŝo post paŝo, la espero venkis. Malgraŭ ke estas okazaĵoj, kiuj neniam estos superitaj, ni klopodas sekvi nian vivon, serĉante la novan normon.

Ni komencis la vojon de la Junularo Esperantista de San-Paŭlo dum tiu malfacila momento, kaj eĉ poste, kiam ni pli sekuras, ni vidas aperon de novaj defioj. Nun, multaj el niaj samideanoj jam revenis al siaj laboroj kaj al siaj klasoj; nun, preskaŭ ĉio ĉeeste.

Ne ĉiuj agaĵoj devas resti en interreto nun. Alvenas espero, sed ankaŭ alvenas novas ebloj.

Nia junularo estas ja juna, sed estas momento por konstrui nian historion. Por tio, ni bezonas unu la alian. Ni ne ĉiam scias kion ni konstruos estonte, sed ni ĉiam devas scii, ke konstruado dependas de ni.

Dankon pro ĉio!

Daniely Silva

*Direktorino de la Junularo
Esperantista de San-Paŭlo*

Lingva Respondo de Francisco Wechsler

Demando

Diversajn prepoziciojn en Esperanto oni povas adverbigi: *en-ene*, *antaŭ-antaŭe*, *post-poste*, *anstataŭ-anstataŭe*, k.a. Ĉu tiu regulo estas ĝenerala? Ĉu oni rajtas adverbigi ĉujn prepoziciojn? Ĉu *pri-prie*, *sen-sene*, *ĝis-ĝise*, *de-dee*, estas normale uzeblaj?



Francisco S. Wechsler

Efektive temas pri du demandoj: 1) ĉu oni rajtas adverbigi ĉiujn prepoziciojn? kaj 2) ĉu certaj adverbigoj estas normale uzeblaj?

Al la unua demando la respondo estas sendube jesa, ĉar tio neniel kontraŭas la gramatikajn regulojn. Fakte, tiaj adverbigoj obeas gravan principon de Esperanto, nome, la eblecon krei vortojn per afiksoj, kunmetaĵoj kaj finaĵoj. Tamen, al la dua demando oni povas doni nur parte jesan respondon.

Pli-malpli rutine adverbigataj estas la jenaj prepozicioj: *anstataŭ*, *antaŭ*,

apud, *ĉirkaŭ*, *dum*, *ekster*, *en*, *inter*, *kontraŭ*, *krom*, *kun*, *laŭ*, *malgraŭ*, *per*, *post*, *preter*, *sub*, *super*, *trans*, *tra*. Tial pri la koncernaj adverbigoj ne necesas doni ĉi tie ekzemplojn. Kontraste, por la aliaj prepozicioj, la adverbigoj estas ankoraŭ eksperimentaj (se tiel diri) aŭ prezentas problemojn.

Kelkaj adverbigoj aperas jen kaj jen:

ĉee (= *ĉe tio*, *proksime*):

*Restu **ĉee**, mi tuj reparolos.* (Claude Piron, *Ĉu vi kuiras ĉine?*)

Ankaŭ aperas jen kaj jen aliaj derivaĵoj de *ĉe*:

Beida-universitato **ĉeas** la malnovan Someran Palacon [...] (*Le Monde Diplomatique*)

La rozkolora konstruaĵo ne tro vid-ebligas sian aĝon; ĝia floranta aspekto eĉ agrable kontrastas kun la poluo de la ĉea bulvardo. (Same)

ele:

La akvo fluis de ŝiaj haroj kaj vestoj, kaj verŝiĝis en ŝiajn ŝuojn kaj elen (= el ŝiaj ŝuoj). (L. L. Zamenhof, *Fabeloj de Andersen* 1).

ĝise (= ĝis tiam, ĝis nun):

[...] *ĝis kiam mi ekkonis Idon, kiun ĝise* [= ĝis tiam] *mi kredis mortinta kaj monstra, [...]* (Gonçalo Neves en *Revuo Monato*)

pore (= *por tio*): mi ne trovis ekzemplojn pri *pore*, tamen kelfoje oni uzas *poro*, *pora* kaj eĉ *pori*. Ĉar *poro* estas ankaŭ oficiala substantivo, kun tute malsama signifo, oni gardu sin de miskomprenigoj.

[...] *diskuti la argumentojn porajn kaj kontraŭajn.* (*La memoraĵoj de Julia Agripina*, Löwenstein, 2021)

Ne estas debato, ne diskuto, ne provo pritaksi la poron kaj kontraŭon de tiu aparta milito. (*Monde Diplomatique*)

Tial ni esperantistoj poras komunan

(kaj ne unikan) lingvon [...] (S. Erhard, *La Ondo de Esperanto*)

prie: ĝia uzado iom post iom pli-vastiĝas, kun la signifo *pri tio*:

Ĉu vi memoras? Oni prie raportis en la novaĵoj. (*Revuo Monato*)

Mi ne volis, ke oni taksu min feministo, mi volis nur prie debati. (*Le Monde Diplomatique*)

Novaj informoj prie aperis nur lastatempe [...] (*Revuo Kontakto*)

proe: *Des pli kiam jam sep nerefuteble talentaj homoj ekŝiĝas proe* [= *pro tio*], *malriĉigante la homan kapitalon de la Asocio.* (A. Martins-Tuvalkin, *La Ondo de Esperanto*)

sene (= *sen tio*): [...] *Filono kaj liaj amikoj aliflanke argumentis, ke ili ne vidas la sencon de tiaj reguloj kaj ke ili tute bone povas adori sian dion sene.* (*La ŝtona urbo*, Löwenstein, 1999)

sure (= *sur tio*):

[...] *leteroj ne estas por legi, sed por malfaldi ilin, meti la vizaĝon suren kaj frenezigi.* (*Ombro sur interna pejzaĝo*, Ŝtimec, 1984)

Ĝi estis solida ondo; mi povis apogi min sure [...] (*La ŝtona urbo*, Löwenstein, 1999).

(*Daŭrigota sur la paĝo 28*)

Instruado de Interlingvistiko kaj de Esperanto en filologiaj kursoj de UFPR

En 2020 estis aprobata reformo de Filologiaj Kursoj de UFPR, Federacia Universitato de Paranao, en Kuritibo, ŝtato Paranao¹; la nun ekzistantaj licenciaj eblecoj estas:

- Lingvopedagogio² — unulingvaj kursoj: Portugala; Angla; Itala;
- Lingvopedagogio² — dulingvaj kursoj: Portugala-Franca; Portugala-Germana; Portugala-Hispana; Portugala-Japana; Portugala-Pola;
- Literaturaj kaj Lingvistikaj Studoj³: Portugala;
- Literaturaj, Lingvistikaj kaj Tradukadaj Studoj³ — unulingvaj kursoj: Franca; Japana; Pola;

- Literaturaj, Lingvistikaj kaj Tradukadaj Studoj³ — dulingvaj kursoj: Portugala-Germana; Portugala-Hispana; Portugala-Latino; Portugala-Malnovgreka.

Aldonendas ankoraŭ Lingvopedagogio de la Brazila Gestolingvo, kiu estas aparta kurso, ne tuŝita de ĉi tiu reformo. En la novstrukturitaj Filologiaj Kursoj estis akceptita mia propono pri tri nedevigaj lernobjektoj por la Pola Filologio, etendebaj por ĉiuj aliaj filologiaj fakoj: *Interlingvistiko*, *Esperanto 1* kaj *Esperanto 2* kun la sekvantaj temaroj⁴:

⁽¹⁾ Ĝeneralan prezenton pri Esperanto kaj Interlingvistiko en UFPR, faritan dum VEKI en 2020, eblas spekti ĉe: <<https://youtu.be/8eBRvDU2kFU>>.

⁽²⁾ Portugale: Licenciatura em Letras.

⁽³⁾ Portugale: Bacharelado em Letras.

⁽⁴⁾ Laŭ Rezolucio 48/2020 de CEPE-UFPR — Konsilio pri Instruado, Esplorado kaj Por-Komunuma Agado, kiu difinas la instruprogramon de la Kurso de Pola Filologio (Literaturaj, Lingvistikaj kaj Tradukadaj Studoj). La temaroj de la nedevigaj lernobjektoj, en la portugala, legeblas ĉe: <<https://depac.ufpr.br/wp-content/uploads/2021/11/Fichas-01-Bach-Polones-Optativas.pdf>>, resp. sur paĝoj 19-20, 105-106 kaj 107-108.

HPAC0415 – Interlingvistiko – 30h – 2 teoriaj lekcihoroj semajne.

Komunikado inter popoloj malsamlingvaj laŭlonge de la tempo — la mito de Babelo. Filozofiaj lingvoj. Planado kaj normigo de etnaj aŭ naciaj lingvoj. Piĝinoj kaj kreoloj. Planlingvoj aprioraj kaj aposterioraj. Volapuko. Esperanto. Ekzameno de unu aŭ pliaj planlingvoj el la sekvanta aro: Ido, Solresolo, Latino sen Fleksio, Okcidentalo/Interlingveo, Interlingvao, Novialo, Loĵbano.

HPAC0508 – Esperanto 1 – 60h – 4 laboratoriaj lekcihoroj semajne.

Esperanto laŭ lingvistika vidpunkto. Etnaj lingvoj kaj planlingvoj. Bazaj morfologiaj procezoj en Esperanto (indikiloj de substantivoj, adjektivoj, adverboj, pluralo kaj akuzativo). Personaj pronomoj. Verboj. Numeraloj. Asertaj, neaj kaj demandaj propozicioj. Korelativoj. Akuzativo. Faktitivo kaj mediala voĉo. Skriba kompreno kaj skriba produktado surbaze de didaktikaj aŭ de aŭtentikaj tekstoj. Aŭda kompreno surbaze de registraĵoj elpensitaj tiucele aŭ surbaze de aŭtentikaj materialoj el esperantlingvaj radioprogramoj, muzikaĵoj kaj aliaj sonaj aŭ filmaj dokumen-

toj. Parola sinesprimo. Elementoj de historio de Esperanto kaj de Esperanta kulturo.

HPAC0509 – Esperanto 2 – 60h – 4 laboratoriaj lekcihoroj semajne. Postulata antaŭscio: HPAC0508.

Ampleksigo de scioj pri Esperanto pere de diversaj komunikcelaj situacioj. Refleksivo. Pliprofundigo pri uzo de korelativoj. Inkoativo. Uzo de akuzativo anstataŭanta prepozicion kaj de akuzativo indikanta metaforan movon. Punktaj temporeferencoj. Kontinuaĵ temporeferencoj. Participoj en Esperanto. Ekzameno de la demando pri aspekto kaj pri kontrasto -ata/-ita. Skriba kompreno kaj skriba produktado surbaze de didaktikaj aŭ de aŭtentikaj tekstoj. Aŭda kompreno surbaze de registraĵoj elpensitaj tiucele aŭ surbaze de aŭtentikaj materialoj el esperantlingvaj radioprogramoj, muzikaĵoj kaj aliaj sonaj aŭ filmaj dokumentoj. Parola sinesprimo. Elementoj de historio de Esperanto kaj de Esperanta kulturo. Originala Esperanta literaturo. “Flugilhavaj vortoj”: interteksteco.

En la listo de lernobjektoj de la nuna Departemento pri Literaturo kaj Lingvistiko (DELLIN-UFPR, antaŭe:

Departemento pri Lingvistiko kaj pri Filologioj Klasika kaj Nacilingva, DLLCV) estas tri nedevigaj lernobjektoj kun la nomo Esperanto, verŝajne postlasaĵoj de karmemora Prof. Geraldo Mattos, kiuj de multaj jaroj ne estas disponigataj, kaj kiuj ne plu apartenas al la nova lernobjektaro de Filologia Kurso. Sube estas informoj pri ili.

HL432 Esperanto – 45h – 1 teoria, 2 laboratoriaj lekciohoroj semajne. Historio de la ideo de internacia lingvo. Strukturo de Esperanto. Evoluo de la lingvo kaj de ties movado. Koncepto kaj celo de Interlingvistiko. Esplorkampoj en Interlingvistiko.

HL084 Esperanto I – 45h – 1 teoria, 2 laboratoriaj lekciohoroj semajne.

Naturaj lingvoj kaj artefaritaj lingvoj. Historio de helplingvoj. Historio de Esperanto. Praktikado de Esperanto.

HL085 Esperanto II – 45h – 1 teoria, 2 laboratoriaj lekciohoroj semajne. Postulata antaŭscio: HL084.

Historio de Esperanta movado. Literaturo tradukita en Esperanton. Originala Esperanta Literaturo. Praktikado de Esperanto.

Oni rimarkas, ke en *HL 084 Esperanto I* estis uzata la klasigo naturaj / artefaritaj lingvoj. En la nunaj lernobjektoj mi preferas pli nuntempan aliron, nome prezenton de konceptoj etnaj lingvoj / planlingvoj, kio laŭ mia vidpunkto estas pli taŭga kaj malpli ema al estigo de antaŭjuĝoj (eĉ pli, kiam oni konsideras la portugalan vorton por “artefarita”, *artificial*).

En la pasintaj monatsesoj jam estis disponigata trifoje *Interlingvistikon* (dufoje neĉeeste pro la pandemio de KOVIM-19) kun entute 21 aprobitoj. En

The screenshot shows the website 'linguas diálogo' with a dark blue header. The main content area is titled 'ESPERANTO EN PARANAO - ESPERANTO NO PARANÁ'. Below the title is a large image of a house with a red roof. To the right of the image is a sidebar with 'Outros artigos' and 'Palavras-chave'. The main text area contains several paragraphs of text, including a section titled 'Kartilio en la Dua Tutmonda Seĝo de Lingvoscienceco pri Esperanto'. At the bottom of the page, there is a small profile picture of Ivan Erik Colding and his name.

ĉi tiu monatseso estas Interlingvistiko kaj unuafoje Esperanto 1, kun po dek aliĝintoj.

Cetere, Esperanto kaj la pola estas kernaj lingvoj en projekto de por-komunuma agado *Lingvoj en Dialogo*⁵. Ni okazigis/okazigas Eo-kurson por la anoj de la projekto — pasintjare partoprenis ankaŭ anoj de similcela projekto de Universitato de San-Paŭlo, *Lingvoj de USP, Lingvoj en USP*. Esperanto enestas en la prezentoj, kiujn la grupo faras al la publiko (ĉefe al lernejoj)⁶.

Mi kaptas la okazon por inviti interesatojn al alia agado de la projekto: la perreta konversacia rondo *Lando Babila*, en la lasta sabato de ĉiu monato (je la 18-a horo laŭ la Brazilja horzono, 21-a horo UTC). Pliajn informojn pri *Lando Babila* karaj legantoj kaj legantinoj povas peti per ret-mesaĝo al <led@ufpr.br>.

Ivan Eidt Colling

<iecolling@yahoo.com.br>

DEPAC/UFPR, CELIN/UFPR

⁽⁵⁾ Portugale: “Línguas em Diálogo” <www.linguasemdialogo.info>.

⁽⁶⁾ Ekzemple, nia grupo kunlaboris en la iniciato de la projekto de USP per prezentoj pri la pola, la havaĵa kaj Esperanto. Ili estas disponigataj, samkiel tiuj de la aliaj lingvoj — Slavono, gvarania kaj haitia kreola—, en la Jutuba kanalo: <https://www.youtube.com/channel/UC-ECnshXnGkiC3wHlUVGl3g>. Portugale: “Línguas em Diálogo” <www.linguasemdialogo.info>.

Daŭrigo de la paĝo 24 - (Lingva Respondo)

*La ŝildoj de mezepokaj kavaliroj ne estis nur protektiloj. La **suraj** insignoj prirakontis la gloron de la posedanto kaj liaj antaŭuloj.* (Y. Lazian, en *La Ondo de Esperanto*)

(Bedaŭrinde la substantivo *suro* ankaŭ estas uzata por nomi krurparton, do oni gardu sin de miskomprenigo.)

Apenaŭ uzeblaj estas *ale, dae, dee, poe*. Eĉ se uzataj, ilia signifo (almenaŭ ĝis nun) estas malklara, do tiuj adverbigoj ne estas pravigeblaj. Krome, ĉar ekzistas la oficiala substantivo *alo*, povus estiĝi konfuzo.

Fine, la prepozicio je kaj ĝia adverbigo *jee* ne havas per si mem signifon, do *jee*, kvankam laŭregule derivita, ne estas pravigebla.

Quer aprender Esperanto?



pma.esperanto.org.br